

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Aliĝu al la 104-a Japana Esperanto-Kongreso!

**Dato:** la 3a, 4a, 5a de novembro 2017**Kongresejo:** “Kanagawa Roodoo Plaza”, en la mezo de Jokohamo**Kongresa temo:**

Haveno peras, Esperanto peras



### Jokohamo 2017

La 104-a Japana  
Esperanto-Kongreso



### Tiel Okazis



#### Prezento de someraj spertoj

**Dato:** la 2a de septembro**Loko:** en la kutima kunvenejo en Jokohamo

En tiu kunsido, 8 personoj preparolis diversajn spertojn en Esperanto, el kiuj 6 temis pri la UK en Koreio kaj spertoj en tiu lando. Aŭskultis 17 klubanoj.

1. Namba Fumiharu pri "La plena suna eklipso en Nordokcidenta Usono"
2. Doi Hirokaz pri "Porinfanaj libretoj en la eŭska lingvo"
3. Tanigawa Hiroshi pri "Antikva Japanio kaj Bekĝe, vizitante antikvan metropolon de Bekĝe nomata Buyeo."
4. Sibayama Zyun'iti kaj Noriko pri "Epizodoj en la Seula UK" (manĝoj, Amikumu, ktp)
5. Suzuki Keiichiro pri "Impreso pri nuna Koreio"
6. Iwaya Mituru pri "Vidindaĵoj ĉirkaŭ Seulo"
7. Doi Ĉieko pri "Renkontiĝoj en Seulo"

#### Ekspozicio pri Esperanto,

kun "la lernolibroj de sia nacia lingvo"

**Dato:** la 11a, 12a, 13a de septembro**Loko:** ekspoziciejo en la kutima kunvenejo en Jokohamo

Okazis kiel anoncite en nia organo n-ro 329 (septembro). Iom pli ol 100 personoj vizitis ĝin.

#### Hama-Ronda Vespero septembra

**Dato:** la 16a de septembro**Loko:** la kutima kunvenejo en Jokohamo

Ĉefa celo estis preparo al la Japana Kongreso, sed la unuaj 15 minutoj estis pri "ludo Amrilato", pri tio sekvas klarigo.

En Japanio lastatempe aperis rolluda komputilludo nomata "Kotonoha Amrilato" (t.e. Lingvo Amrilato). Tie unu knabino estis subite transportita al nekonata fremda lando, kies lingvo estas nomata Juliamo – kio efektive estas Esperanto, sed skribita en deformita alfabeto. En la ludo estas eĉ kurso de tiu Juliamo. Pro tio, miloj da neesperantistoj konatiĝis al tiu fremda lingvo. Feliĉe la scenariisto de la ludo nomata J-Ment, vizitis la supran Ekspozicion, kaj denove vizitis nin. Kune kun s-ro Seŝimo Masaja, juna esperantisto, ni aŭskultis pri tiu ludo.

---

---

## La 108a Legokunsido

---

---

En la 9a de septembro, ni havis la 108an legokunsidon por “Surklifa” de Serĝo Elgo. Partoprenis kvin personoj.

### Komentoj pri “Surklifa”, libro por la 108a legokunsido

Aida Yayoi

Sekvi la rakonton estis iom malfacile en la komenco pro diversaj personoj sinsekve aperantaj en ĉiu nova sceno kaj ĉapitro. Kvankam iliaj rilatoj kaj roloj iom post iom evidentiĝas laŭ la progreso de rakonto, por preciza kompreno aŭ pozitiva rezono pri la enigmo, oni devas atendi iom longe, proksimume ĝis la fino. Tio estas kutima tendenco de la detektiva romano, kaj mi ne plendos pri tiuj rutinoj, la strukturaj pretervojaj aŭ aventuraj anekdotoj. Mi tamen pensas, ke multe da pretervojaj epizodoj ĉi tie ĝenus malpaciencajn legantojn kaj forprenus de ili eksciton por legi unuspire kaj renkonti surprizan renverson. Kompreneble mi ne neas, ke tiu malfrua atingo al la solvo estas ĝuo por ĝeneralaj favoruloj de detektiva romano. Ili sentos, ke ju pli multiĝas la epizodoj, des pli profundiĝas la intrigo.

Sur privata danĝera vojo, serpentumanta montovojo, okazis du motor-akcidentoj kaj mortigis du veturigantojn. Ambaŭ estis revenantaj el la impona domo “Surklifa”, fermita al la loka komunumo. Ĉar la aferoj ne estis simplaj akcidentoj, baldaŭ aperis inspektoro Kramer, ne alloga kiel Sherlock Holmes kaj laŭkondukte banala, sed paŝon post paŝo li serĉas spuron de la afero tra multfojaj intervjuoj de la koncernatoj, kaj fine sukcesis solvi la enigmon. La proceso, tamen, ne ĉiam ligiĝas rekte kun la akcidento aŭ ĝia kerno sed iras libere al flankaj vojoj aŭ epizodoj, kaj tio donas sendependajn distraĵojn, kiel mi menciis en la antaŭa alineo. Pro talenta aŭtoro tiaj devojiĝoj devas esti refreŝiĝoj ankaŭ al li mem.

Ĵaluzo invitis murdon. Tio ne estas malofta fenomeno. Sed ĉi tie ĵaluzo estis eksterordinara kaj neimagebla. La inspektoro ne povus solvi la aferon sen la helpoj de du viroj, Ivan, frato

de Anna kaj Belkura, klarvida sed iom cinika kriplulo. Anna estas belega virino, kiu “nevole, per nura rigardo delogas virojn”, tial “ĉiuj virinoj malamegas ŝin”. “Ĉiuj viroj perokule voris ŝin.” Tiaj mallongaj sed trafaj esprimoj troviĝas tie kaj tie. La amaferoj inter Anna kaj Ivan provokas eksciton kontraste al malvarma rilato inter la geedzoj, Anna kaj Selingen. Loĝantoj en la Surklifa ĉirkaŭ ĉefroluloj havas unikan personecon kaj ili ankaŭ interesas min.

### Maturiĝo de esperanta literaturo “Surklifa” de Serĝo Elgo

Mizro Iwaya

Luksa domo sur la monteto de la urbo estis nomata Surklifa Kastelo. Tie okazis du trafikaj akcidentoj kun iom da interspaco, kie aŭtoj falis en ravinon kaj la ŝoforoj mortis. Detektivo Kramer komencis sian esploron pri tiu stranga identeco.

Tiamaniere komencas sin la historio. Oni diras ke la aŭtentika krimromano devas:

- \* aperigi nur necesajn rolulojn kaj epizodojn,
- \* aperigi la krimulon en frua etapo,
- \* disvolvi la historion per logika prezento,
- \* solvi la problemon kun konkreta pruvo.

Tiusence, oni diras, “La tragedio de Y” estas pinta ekzemplo de aŭtentika krimromano. Ĝi komplete kontentigas suprajn principojn. Nun mi volas diri ke ankaŭ esperantaj krimromanoj proksimiĝas al tiu ortodokseco. Mi ne volas elmontri detalan difekton troveblan en la verko, sed diri ke la ĝenerala tendenco direktas sin al tio.

La pionira verko en tiu kampo “Ĉu li kuiras ĉine?” estas fakte interesa. Sed ĝi ne obeas suprajn kvar regulojn. Dume tiu ĉi temata verko plejparte obeas la principojn de krimromano. Tial ĝi estas “normale” interesa. Tiu normaleco estas valora precipe en Esperanto, kie ne sufiĉas kultura tradicio. Normaleco naskiĝas nur el

abundeco. Do tiu ĉi verko markas riĉecon kaj abundecon de esperanta literaturo. Ĝi pruvis sin maturiĝanta kaj populariĝanta.

### La komenco kaj la fino surklifaj

Sibayama Zyun'iti

La librotitolo “Surklifa” devenas de la nomo de riĉula, entreprenista domo sur klifo, en eŭropa lando ne-indikita, sed verŝajne en Francio – ĉar la lando estas kun maro, kun historio ke Nazio iam okupis la grandan domon surklifan. Ne-literatura maniero konfirmi tion estas, ke la aŭtoro Serĝo Elgo estas franco, kun vera nomo Georges Lagrange.

En la libro, okazis akcidento, ke aŭto de gasto vizitinta la Surklifan domon, malsupreniranta vojon kun multaj kurboj – ĝiroj, laŭ la lingvouzo en la libro – falis de klifo, kaj la ŝoforinta gasto mortis. Ĝi ne estas simpla akcidento sed intencita intrigo – tion malkaŝi estas permeseble, mi pensas, ĉar sen tio, libro pli ol 200 paĝoj ne tenas motivon plulegi.

Fakte la librokomeno estas tre streĉa, kvazaŭ oni malsupren glitas klifon. Polic-oficiro s-ro Kramer komencas enketi ĉe diversaj personoj intensive, ĉar li eksciis strangaĵon:

antaŭ kelkaj jaroj okazis samsituacia akcidento. Kaj Kramer... nu, 80 procentoj de la paĝoj meze estas Kramer-a enketado. Foje li faras tion mem trinkante ruĝan portovinon en bazaro, aŭ ofertas tiun tason al enketito – ĉu permeseble en Japanio? –, preskaŭ sola, malsimile al japanaj policaj rakontoj ke policianoj enketas duope. Nu, tiel iom post iom klariĝas la profiloj de la koncernuloj, nome, la riĉulo en Surklifa, tiea servisto, ktp. La plej grandan atenton Kramer turnis al la edzino de la riĉulo, nome lia edzino dua, kiu mem havas la riĉulon kiel la duan edzon, ĉar la unua edzo akcidente mortis en la deklivo. Ŝi estas “virino fatala”, kun multa allogo al viroj. Tiun enketadon helpas per komentado bazaraj ĉiamuloj, ekzemple eksa poŝtisto gvidas Kramer-on al iu adreso malfacile atingebla.

Sed tiu parto estis iom teda kaj tro longa por mi. En la fino, unu el la enketitoj de Kramer ekagis kontraŭ iuj aliaj enketitoj, kaj tie la rakonto denove supreniras klifon. Tie oni scias ke la akcidento-j estis intencita-j.

Resume, interesa detektivaĵo, sed mi pli ĝuus, se la meza parto estus malpli longa.

---



---

## Reagoj

---



---



### Leter-interŝanĝo pri Usonaj Militaj Instalaĵoj

En la antaŭa n-ro 329 aperis artikolo de s-ro Tanigawa Hiroshi. Pri tio komentis nia ĉina leganto, s-ro Ji Yingeng, kaj okazis leter-interŝanĝoj.

2017-09-13

Estimata redaktoro,  
Saluton!

Kiam mi finlegis la eseon “La Usonaj Militaj Instalaĵoj en Jokohamo” en la numero 329 de la gazeto Novaĵoj Tamtamas, mi ekmemoris, ke iam mi legis ke je la dua Mondmilito, kiam la armeo de la ĝenerala komandanto de la Aliancarmeo Douglas MacArthur atingis Japanion, la soldatoj traktis la japanajn popolanojn tre ĝentilece kaj amike. Estis la generalo Douglas MacArthur, kiu alportis al la japanaj popolanoj demokration kaj liberon. Kiam la generalo Douglas MacArthur foriris de Japanio, la japanaj popolanoj memkonscie viciĝis ambaŭflanke de la stratoj por

adiaŭi lin kaj multaj el ili eĉ ploris. Ili esperus ke la generalo ne foriru.

Ji Yingeng



Jokohamo, 14/sept 2017

al estimata S-ro Ji Yingeng

Antaŭ ĉio mi dankas vin pro via mesaĝo pri mia ese “la Usonaj Militaj Instalaĵoj en Jokohamo” en “Novaĵoj Tamtamas” n-ro 329. Ricevi reagon rilate la artikolon estas por ĝia verkinto tre ĝojige. Leginte vian mesaĝon mi iomete retrospektis la grandegan, superfortan influon de La Ĉefsidejo

de Alianca Armeo por la postmilita Japanio.

Kiel vi skribis, la usonaj armeanoj pritraktis japanojn amike, ĝentile. Estas dirite, ke tia ĝentileco necesis por senkonflikte plenumi la okupadon super la tuta Japanio.

Ni jokohamanoj estis grave damaĝitaj de la dummilitaj bombardoj fare de la usona armeo. Kaj aldone la postmilita grandskala rekvizicio de la terenoj kaj instalaĵoj suferigis Jokohamanojn kiuj mizerege vivis pro la absoluta manko de manĝo, loĝloko, ĉiaspecaj vivnecesaĵoj.

Sed, aliflanke, la usona armeo donis al Japanio gravan unuan paŝon al la postmilita demokratio. Tio konsekvencis al la Nova Japana Konstitucio kiun la plej multo de japanoj bonvenigis pro ĝiaj gravaj principoj: la suvereneco de la popolanoj, homaj rajtoj, kaj pacifismo.

La komenciĝo de la Granda Milito estis neniel pardonebla invado al Ĉinio fare de japana armeo. La okupo de t.n. Manĉurio (norda regiono de Ĉinio) estis la unua paŝo de la japana militarismo. Tion ni japanoj nepre devas ne forgesi, mi pensadis. Ĉiuokaze nuntempe ni, japanoj, kaj vi, ĉinoj kunvivas pace. Tio ĉi tio, mi kore deziras, estu pli firmigota.

kun koraj dankesprimoj,

Tanigawa (谷川 famili-nomo)

Hiroshi (弘 person-nomo)

p.s.

Mi nun estas 81-jara (naskita en 1936). Kiam finiĝis la Mondmilito (1945) mi estis en la nuna suda Koreio. Post la militfiniĝo nia familio revenis al la Gubernio Kumamoto, la hejmloko de miaj gepatroj. Mi hontas, ke nia familio vivis sub la tendaro de japana imperiismo.

Mi studis en Tokio kaj laboris 30 jarojn kiel urbooficisto de Urbo Jokohamo ĉefe en la bonfarta fako. Nun mi, pensiulo, loĝas en Jokohamo por 50 jaroj.



Septembro 15, 2017

Estimata Tanigawa,

Mi treege dankas vin pro via letero, kiun transsendis al mi mia japana amiko SIBAJAMA Noriko, kiun mi ankaŭ dankas treege.

Mi tre konsentas pri tio, kion vi skribas en la letero. Via Esperanto-nivelo estas tre alta kaj mi devas lerni de vi.

Mi naskiĝis en 1934. Tio estas, ke mi estas pli maljuna ol vi je 2 jaroj.

Ĉion bonan al vi kaj viaj familianoj.

Ji Yingeng



2017-09-15

Estimata S-ro Ji Yingeng

Kun plezuro mi ricevis vian retleteron. Koran dankon pro via tuja mesaĝo.

Vi skribis, ke vi tre konsentis pri tio, kion mi skribis. Mi tre ĝojas, ke mia baza koncepto pri la historio inter Japanio kaj Ĉinio kunsentiĝis de vi. Vi skribis, ke vi naskiĝis en 1934, do, 2 jarojn pli frue ol mi. Supozeble vi pasigis viajn infanajn 10 jarojn tre malfacile, pro la Milito kiun kaŭzis la invado de japana armeo al via lando. Tion mi tre, tre, domaĝas.

Ĉiuokaze mi konstatas, ke ni povos vivi kune pace, amike.

kun koraj bondeziroj al vi kaj al via familio,

Tanigawa Hiroshi

p.s. Mi vivas duope kune kun mia edzino. Ni fartas bone. Bedaŭrinde mia edzino ne scipovas esperanton. Tamen mi kontentiĝu, ke ŝi estas almenaŭ bonkora al esperanto.



2017-09-15

Estimata S-ro Tanigawa Hiroshi,

Mi tre dankas vin pro tio, ke vi tuj sendis al mi retleteron.

Mi kredas ke ĉina kaj japana popoloj povas vivi pace kaj amike.

En 1934 mi naskiĝis en iu kamparo de la gubernio Xianju, provinco Zhejiang. La japana armeo ne atingis mian vilaĝon. Mian infanecon mi trapasis sekure en la kamparo.

Mi diplomiĝis je la Ruslingva fakultato en la Shanghai-a fremdlingva universitato en 1960. La Dua lingvo, kiun mi lernis en la universitato, estas la angla lingvo.

Mi ekmemlernis Esperanton somere de la jaro 1978. Mia edzino ankaŭ iomete scias Esperanton. Ni havas komunan lingvon. Ŝi estas pli juna ol mi je 21 jaroj. Ŝi ankoraŭ estas plena de energio kaj donas al mi apartan prizorgon.

Ĉion bonan al vi kaj via edzino.

Ji Yingeng